

**NSiR - Nova Sento in Rete
N. 1019 (33/2019)**

Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana

Federazione Esperantista Italiana: posta fei@esperanto.it ; internet
<http://www.esperanto.it>

Itala Esperantista Junularo: posta iej@esperanto.it ; internet
<http://iej.esperanto.it>

Via Villoresi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Norberto Saletti notiziario@esperanto.it
indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"

NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR
I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.

Le lettere non firmate non saranno pubblicate.

Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.

ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA

<http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm>

LIBRERIA

<http://www.esperanto.it/libri.htm>

feilibri@esperanto.it

INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA

Il Congresso Nazionale: <http://kongreso.esperanto.it>

Il Festival Giovanile di Pasqua: <http://iej.esperanto.it/ijf>

IL 5 PER MILLE ALLA FEI

Indicate il codice fiscale **80095770014** nella vostra dichiarazione dei redditi,
realizzeremo grandi progetti!

Indice articoli

| | |
|--|---|
| - Konkursoj de IEF | 2 |
| - Kio? Ĉu vere vi ankoraŭ ne aliĝis al la Nacia Kongreso 2020? | 4 |
| - Opero en Esperanto | 5 |
| - <i>Sisteme Ordigita Vortaro</i> bezonas helpon..... | 6 |
| - Un nuovo sito per imparare..... | 6 |
| - Pillole di Salvezza 1019: La Secchia Rapita | 6 |

KONKURSOJ DE IEF

1) TRADUKKONKURSO DE LA ITALA AL ESPERANTO

Itala Esperanto-Federacio organizas literaturan tradukkonkurson de la itala al Esperanto.

La konkurso konsistas el du branĉoj,

poezio: maksimuma longo ne fiksita;

prozo: (rakonto, novelo) maksimuma longo 13.000 tajperoj.

La komisiono povos asigni ĝis tri premiojn por ĉiu branĉo.

Ĉiu persono rajtas konkursi por ĉiu branĉo per maksimume tri verkoj, kies tradukoj devas esti neniam antaŭe eldonitaj per ajna komunikilo (prese, rete, lege, blogo, ktp). Ne eblas partopreni per traduko de propraj verkoj, ankaŭ se la itala originalo estas eldonita.

La gajnintoj de la unua premio ne rajtas partopreni en la konkurso en la sama branĉo dum la sekvaj tri jaroj.

La konkursaĵojn, kune kun la originaloj, oni sendu al la sekretario, Ivan Orsini, prefere per retmesaĝo, al la adreso concorso@esperanto.it indikante la branĉon, la elektitan pseŭdonimon kaj la efektivan nomon kaj adreson. Se tio ne eblas, oni sendu ilin papere al la adreso

Federazione Esperantista Italiana, via Villoresi 38, 20143 Milano, Italia,

indikante sur la koverto "literatura konkurso" kaj enmetante la kontribuaĵo(j)n kaj la originala(j)n tradukita(j)n verko(j)n sen ajna indiko kaj notante en aparta folio ĉiujn necesajn indikojn kiel supre.

Premioj: la gajnintoj de la unua premio de la du branĉoj ricevos akvaforton originale verkitan por la premio Zamenhof, por la aliaj la premio konsistos el esperantlingvaj libroj. La unua premio en la branĉo "poezio" havas titolon "Gaudenzio Pisoni"; la unua premio en la branĉo prozo havas titolon "Lina Gabrielli". La disdono de la premioj okazos dum la koncerna kongresa programero; se premiito ne ĉeestos ĝin, tiu estos kontaktata pri la livero.

Limdato por la sendado estas la 30-a de aprilo de la koncerna jaro.

Juĝkomisiono: prezidanto: Carlo Minnaja, sekretario: Ivan Orsini; por branĉo poezio: Giulio Cappa, Nicolino Rossi, Nicola Ruggiero; por branĉo prozo: Gabriele Aquilina, Nicola Minnaja, Norberto Saletti.

La sekretario informos ĝis la 1-a de aŭgusto la gajnintojn pri la premio.

La partoprenantoj cedas senpage al IEF por la unua jaro la rajton je unua publikigo.

Por **pliaj informoj** : concorso@esperanto.it

FEI, concorso, via Villorosi 38, 20143 Milano, Italia

2) ORIGINALA KANZONO EN ESPERANTO

Itala Esperanto-Federacio, por omaĝi Gianfranco Molle, la plej faman italan kantiston, tutmonde konatan, animon de "Muzika Kulturo", decidis organizi konkurson pri kanzonoj originale verkitaj en Esperanto.

La komisiono povos asigni ĝis tri premiojn.

La rezultoj estos anoncitaj enkadre de la itala kongreso de Esperanto, dum specifa programero.

Ĉiu persono rajtas konkursi per maksimume tri verkoj, kiuj devas esti neniam antaŭe eldonitaj per ajna komunikilo (prese, rete, lege, bloge, ktp).

Maksimuma daŭro de kanzono estas 5 minutoj.

La gajnintoj de la unua premio ne rajtas partopreni en la konkurso dum la sekvaj tri jaroj.

La konkursaĵojn oni sendu al la sekretario, Ivan Orsini, per retmesaĝo, al la adreso concorso@esperanto.it indikante la elektitan pseŭdonimon kaj la efektivan nomon kaj adreson; ili estu kantitaj kaj luditaj en aŭda formato mp3 aŭ ogg, kaj skribitaj (nur vortoj, eventuale kun akordoj) en teksta formato doc aŭ odt.

Premioj: la gajninto de la unua premio, premio Ĝanfranko, ricevos monpremion de 250,00 eŭroj, por la aliaj la premio konsistos el esperantlingvaj KD-oj.

Limdato por la sendado estas la 30-a de majo de la koncerna jaro.

Juĝkomisiono: prezidanto: Carlo Minnaja, sekretario Ivan Orsini, juĝantoj: Giulio Cappa, Marcella Fasani, Bertilo Wennergren.

La sekretario informos ĝis la 1-a de aŭgusto la gajnintojn pri la premio.

La partoprenantoj cedas senpage al IEF por la unua jaro la rajton je unua publikigo.

Por **pliaj informoj** : concorso@esperanto.it

FEI, concorso, via Villorosi 38, 20143 Milano, Italia



Cari amici,

dal primo ottobre è ufficialmente consultabile il sito :kongreso.esperanto.it/87 in cui troverete tutte le informazioni pratiche sulla sede congressuale, troverete il modulo d'iscrizione, le quote, le modalità di pagamento, e, a poco a poco, le informazioni logistiche, sulle escursioni, sul programma.

Visitelo subito ed iscrivetevi, e continuate a visitarlo con regolarità per essere aggiornati!

Buona lettura e **ARRIVEDERCI AD ASSISI** dal 22 al 29 agosto 2020.

Michela

OPERO EN ESPERANTO



La 27-an de septembro 2019 (je la 19:00 CEST, 17:00 UTC) la Nacia Teatro de Prago eksurscenigis la operon *Sternenhoch* kadre de la Internacia Teatra Festivalo en Nitro (de la 27-a de septembro ĝis la 2-a de oktobro 2019). La prezentaĵo estas rete vivelsendata kun subtekstoj en la ĉeĥa, la angla kaj aliaj lingvoj. La premiero de tiu ĉi versio okazis la 7-an de aprilo 2018 ĉe la Nacia Teatro en Prago, Ĉeĥio, kaj ĝi estas la unua komplete esperantlingva lirika opero. La libreto, verkita de la ĉeĥa komponisto Ivan Acher surbaze de la groteska, ekspresionisma romano *Utrpení knížete Sternenhoch* ("La suferoj de la princo Sternenhoch"), publikigita en 1928 de la ĉeĥa poeto kaj filozofo Ladislav Klíma, estis rekreita en Esperanto de la ĉeĥa esperantisto Miroslav Malovec, kiu ricevis la diplomon de UEA pro Elstara Arta Agado en 2019 sekve de tiu traduko. La kultura platformo OperaVision (<http://operavision.eu>), financita de la programo de Eŭropa Unio "Kreiva Eŭropo" kaj disponebla en la franca, en la germana kaj en la angla, celas konatigi la mondon de opero al la plej vasta kaj diversaĝa publiko per reta dissendo kaj disponigo de operoj, al kio aldoniĝas artikoloj, intervjuoj kaj aliaj uzeblaj rimedoj por la publiko, kiu alproksimiĝas al tiu arta formo kaj deziras plukreskigi siajn konojn tiurilate. La projekto kunigas 29 partnerojn el 17 eŭropaj landoj kaj disvolviĝas sub la superrigardo de Opera Europa, asocio de operaj kompanioj kaj festivaloj en Eŭropo. Kadre de tiu ĉi ampleksa kultura projekto la opero *Sternenhoch* estas rete vivelsendata kaj restos rete spektebla ĝis la 26-a de marto 2020. La tuta enhavo estas spektebla senpage, kun subtitoloj en la franca, en la germana kaj en la angla, kun ebleco je aŭtomataj subtekstoj en 114 pliaj lingvoj. Trovu ligilon al la opero *Sternenhoch* en OperaVision ĉi tie: <https://operavision.eu/en/library/performances/operas/sternenhoch-national-theatre-prague>. Aldone al la filmo de la opero, ĉe la retpaĝo de OperaVision disponeblas aliaj filmetoj kaj intervjuoj. Se vi deziras malkovri pli pri la fono de la opero kaj pri la elekto de Esperanto por tiu ĉi opero, bv. spekti ĉe Jutubo mallongan prezenton de la reĝisoro Michal Dočekal (<https://www.youtube.com/watch?v=Hziv3vOx9a0>) kaj tre interesan intervjuon kun la komponisto Ivan Acher, kies unua verko estis fakte *Sternenhoch* (<https://youtu.be/pE1ieVjoPY4>). Ambaŭ kontribuoj estas subtekstitaj en Esperanto. UEA varme invitas ĉiujn interesitojn spekti la operon kaj tiel subteni tre gravan kaj interesan manifestiĝon de nia lingvo en la internacia kultura medio.



Pier Luigi Cinquantini intencas revizii la *Sisteme Ordigitan Vortaron* de Michele Mariano, pri kiu vi povas legi ĉi tie:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Sisteme_Ordigita_Vortaro

“SOV estas grandega verko de Michele Mariano (+), norditalo, kiu prilaboris ĝin dum multaj jaroj. Verko kiu estas unika kaj mankas en multaj lingvoj. Kiam ĝi estis presita, fare de *Plejado* de Lina Gabrielli, estis nur fotokopiitaj la slipoj de la aŭtoro, kaj kunmetitaj. Do, la slipoj estas maŝinskribitaj, kun linioj strekitaj per liniilo, kaj ofte kun aldonitaj notoj manskribitaj. Mia laboro konsistus en la komputila rearanĝo (praktike, sistema re-ordigo). La laboro de la kunlaboranto (=ĉefa laboranto) estus "kompreni" entute la vortaron (ekzemple, mi ofte ne komprenas la logikajn rolojn de kelkaj linioj disdividaj, aŭ notojn resendajn en kelkaj paĝoj), aldoni kaj situigi la novajn terminojn kaj mallonge difini ilin (en la fina indekso). Por mi estas malfacile entute kompreni la logikon de la sistemigo, do tio laŭ mi estas la ĉefa peno en ĉi tiu projekto.”

Se vi interesiĝas pri vortaroj kaj pretas kunlabori kun Pier Luigi, bonvolu kontakti renato@esperanto.org

UN NUOVO SITO PER IMPARARE

Date un'occhiata a questo interessante sito!

https://lernu.net/it?fbclid=IwAR1xi9wI_pznVNr8507EkhKNGot7S1g1e442x9touvy_NFq5bAslg5L8Tfc

PILLOLE DI SALVEZZA 1012: *La Secchia Rapita*

Il 28 settembre è l'anniversario della nascita (nel 1565) del poeta e scrittore italiano (modenese) Alessandro Tassoni (1565-1635)

it.wikipedia.org/wiki/Alessandro_Tassoni famoso per il poema eroicomico in ottave "La secchia rapita", pubblicato nel 1621, il quale, prendendo spunto da un umile fatto storico (la battaglia di Zappolino del 1325, in cui i modenesi, inseguendo i bolognesi fin dentro la loro città, portarono via come trofeo – quindi "rapirono" – una modesta secchia), www.modenatoday.it/cronaca/curiosita-modenesi-la-storia-della-secchia-rapita-tassoni-tortellini.html presenta una serie di scene "serie" alternate ad altre beffarde e sarcastiche. Tassoni pretendeva di aver creato un nuovo genere letterario; ma in fondo continuava tradizioni satiriche anteriori, ad esempio quella di Francesco Berni (1497-1535) e del poeta in latino "maccheronico" Teofilo Folengo it.wikipedia.org/wiki/Teofilo_Folengo.

Trascriviamo, in italiano e nella traduzione in Esperanto, le prime 12 ottave del poema. Alleghiamo il francobollo italiano del 1965 per il quarto centenario della nascita di Alessandro Tassoni, con il ritratto dello scrittore e un episodio de "La secchia rapita".

| | |
|--|--|
| <p>I. Vorrei cantar quel memorando sdegno ch' infiammò già ne' fieri petti umani un'infelice e vil secchia di legno, che tolsero ai Petroni i Gemignani. Febo che mi raggiri entro lo 'ngegno l'orribil guerra e gli accidenti strani, tu che sai poetar, servimi d'aio, e tiemmi per le maniche del saio.</p> <p>II. E tu, nipote del rettor del mondo, del generoso Carlo ultimo figlio, ch' in giovinetta guancia e 'n capel biondo copri canuto senno, alto consiglio; se dagli studi tuoi di maggior pondo</p> | <p>1. Volus mi kanti pri la fama indigno, kiu jam flamis en fieraj homoj, pro fatala mizer', sitel' el ligno, kiun Modeno rabis al Petronoj (2). Feb' (3), kiu pri l' milit' teruran signon al talent' mia metas je dispono, vi poemanta helpu al mi varte, per la roba manik' min tenu garde.</p> <p>2. Kaj vi (4) nevo de la regant' de l' mondo, de l' grandanima Karlo lasta filo, kiu sub juna vang' kaj hara blondo gardas maturan saĝon kaj konsilon, se turnas vi el via studorondo</p> |
|--|--|

| | |
|---|--|
| <p>volgi talor per ricrearti il ciglio, vedrai, s' al cantar mio porgi l'orecchia, Elena trasformarsi in una secchia. III. Già l'aquila romana avea perduto l'antico nido, e rotto il fiero artiglio tant' anni formidabile e temuto oltre i Britanni, ed oltre il mar vermiglio: e liete, in cambio d'arrecarle aiuto, l'italiche città del suo periglio, ruzzavano tra lor non altrimenti che disciolte poledre a calci e denti. III. Sol la reina del mar d'Adria, volta dell'oriente alle provincie, ai regni; dalle discordie altrui libera e sciolta, ruminava sedendo alti disegni; e gran parte di Grecia avea già tolta di mano agli empi usurpatori indegni: l'altre attendean, le feste, a suon di squille a dare il sacco alle vicine ville. V. Part' eran ghibelline, e favorite</p> | <p>kelkfoie, por distriĝo, la pupilon, se streĉos vi al mia kant' orelon, Helena-n vidos vi iĝi sitelo. 3 Estis perdinta jam la aglo roma (5) antikvan neston (6) kaj ungegan faron, terurtimitan dum jarar' tioma trans Britujo kaj trans la ruĝa maro: l' italaj urboj ja sen help' ioma al ĝi porti, nur ĝojaj pri la falo petolis inter si same prudente kiel senbridĉevaloj hufe, dente. 4. Nur la reĝin' de l' mar' adriatika (7) zorga al orientaj landoj, regnoj, de l' alies malpacoj jam senliga, sidante maĉis jen altajn desegnojn, kaj parton de Grekuj' per elmaniga ag' ĝi fortiris de l' uzurpa regno (8), l' aliaj al najbaraj urboj rabojn portis dum fest' je l' sonorilaj frapoj. 5 Kelkiuj gibelinis' (9) favorataj</p> |
|---|--|

| | |
|--|--|
| <p>dall'imperio aleman per suo interesse: part'eran guelfe, e con la Chiesa unite, che le pascea di speme e di promesse. Quindi tra quei del Sipa antica lite e quei del Potta ardea; quando successe l'alto, stupendo e memorabil caso che ne gli annali scritto è di Parnaso. VI. Del celeste Monton già il sol uscito, saettava co' rai le nubi argenti. Parean stellati i campi e 'l ciel fiorito, e sul tranquillo mar dormieno i venti: sol Zefiro ondeggiar facea sul lito l'erbetta molle e i fior vaghi e ridenti; e s'udian gli usignuoli al primo albore, e gli asini cantar versi d'amore. VII. Quando il calor della stagion novella, che movea i grilli a saltellar ne' prati, mosse improvvisamente una procella di Bolognesi a' loro insulti usati. Sotto due capi a depredar la bella</p> | <p>de l' germanreĝ' por lia intereso; aliaj gelfis al la pap' ligataj, kiu donis esperon kaj promeson: tial ardis kvereloj malnovdataj inter la urboj du, kiam sukceson havis mirinda memorinda kazo, skribita en kroniko de Parnaso (10). 6. El la virŝaf' la suno (11) jam elvenis, la frostajn nubojn sagis ĝi per fendoj, stelpompis kampoj kaj ĉiel' florplenis, kaj sur trankvila mar' dormis la ventoj: nur por zefir' sur bordoj onde tremis la dolĉa herb' kaj ĉarmaj floretendoj: aŭdiĝis najtingaloj kaj azenoj ĉe la tagiĝo kanti ampoemojn: 7. kiam la varmo de l' printempsezono, kiu la grilojn pelis al saltado, abrupte senbridigis ventciklonon da Bolonjanoj al kutima bato: eliris ili, rabis laŭ ordono la belajn bordajn kampojn de Panaro</p> |
|--|--|

| | |
|---|--|
| <p>riviera del Panaro usciro armati: passaro il fiume a guazzo, e la mattina giunse a Modena il grido e la ruina. VIII.Modana siede in una gran pianura che dalla parte d'austro e d'occidente cerchia di balze e di scoscese mura del selvoso Appennin la schiena algente, Apennin ch'ivi tanto all'aria pura s'alza a veder nel mare il sol cadente, che sulla fronte sua cinta di gelo pare ch'incurvi e che riposi il cielo. IX.Dall'oriente ha le fiorite sponde del bel Panaro e le sue limpid'acque; Bologna incontro; e a la sinistra, l'onde dove il figlio del Sol già morto giacque: Secchia ha dall'aquilon, che si confonde ne' giri che mutar sempre le piacque; divora i liti, e d'infecunde arene semina i prati e le campagne amene. X.Viveano i Modanesi alla Spartana,</p> | <p>(12); ili l' riveron vadis: la matenon krioj, ruin' alvenis al Modeno. 8 Kuŝas Modeno sur vasta ebenaĵo, kiun ringas, al sud' kaj okcidento, per abruptaj rokaroj kaj krutaĵoj, la Apenina neĝa dorsetendo; Apenin' tiom altas en malkaŝo, ke vidas ĝi en mar' la sundescendon, kaj en frunt' ĝia, per la neĝ' kronita, ŝajnas ĉiel' ripozi kurbimita. 9 Male Bolonjo oriente estas De l' helaj akvoj kaj de l' flora bordo de Panar' bela, kaj maldekstre nestas l' ond' (13), kie la Sunfil' falis en morto, norde ĝi havas Secchia (14), kiu festas en ŝanĝaj turnoj laŭ la plaĉa tordo, manĝegas bordojn kaj, per malfekundaj sabloj, herbejojn, kampojn pleninundas. 10. La modenanoj laŭspartane moris,</p> |
|---|--|

| | |
|--|--|
| <p>senza muraglia allor né parapetto; e la fossa in più luoghi era sì piana, che s'entrava ed usciva a suo diletto.</p> <p>Il martellar della maggior campana fe' più che in fretta ognun saltar dal letto.</p> <p>diedesi all'arma; e chi balzò le scale, chi corse alla finestra, e chi al pitale.</p> <p>XI. Chi si mise una scarpa e una pianella, e chi una gamba sola avea calzata; chi si vestì a rovescio la gonnella, chi cambiò la camicia coll'amata: fu chi prese per targa una padella, e un secchio in testa in cambio di celata; e chi con un roncone e la corazza corse, bravando e minacciando, in piazza.</p> <p>XII. Quivi trovar che 'l Potta avea spiegato lo stendardo maggior con le trivelle; ed egli stesso era a cavallo armato con la braghetta rossa e le pianelle.</p> | <p>sen muregoj kaj digoj tiam vivis; kaj pluraloke la fosaĵ' favoris en- kaj el-iron, laŭ la plaĉ' modifis.</p> <p>Plej granda sonoril' tiel fervoris martele, ke el lito ĉiu drivis: estis alarm'; kaj iuj al teraso, al pordo kuris aŭ al noktovazo.</p> <p>11. Iu surmetis ŝuon kaj babuŝon, iu nur unu kruron al si vestis, iu renversis jupon pro la fuŝo, por iu l' amatin' ĉemizo estis; iu por ŝild' el pato faris uzon, por kask' sur lia kap' sitelo restis; kaj iu kun falĉilo kaj kiraso fanfarone minacis en la placo.</p> <p>12. Tie de la urbeŝtr' estis svingita la granda flago kun boril' (15) sur fono; kaj li mem estis sur ĉeval', armita, kun babuŝoj kaj ruĝa pantalono.</p> <p>Estis modena skrib' mallongigita "Potta" por "Podestà" (16) sur la</p> |
|--|--|

| | |
|---------------------------------------|-------------------------------------|
| Scriveano i Modanesi abbreviato | diplomoj; |
| Pottà per potestà sulle tabelle: | pro tio l' bolonjanoj per dir' moda |
| onde per scherno i Bolognesi allotta | lin moke nomis inter si "la |
| l'avean tra lor cognominato il Potta. | Potta". (17) |

Alessandro Tassoni, "La sitelo rabita", kanto 1-a, oktavoj 1-12, trad. Giordano Azzi, "Itala Antologio", COEDES/ FEI, Milano 1987, p. 218-222

Notoj:

(1) Estas tradukitaj la unuaj dekdu stancoj de la unua kanto. La kanvaso de la heroeposo estas teksita per la fando de du militoj inter la modenanoj kaj la bolonjanoj: tiu, kiu finiĝis en 1249, kaj tiu de 1325 kiam la modenanoj venkis la bolonjanojn kaj kaptis kiel trofeon unu sitelon.

(2) Petronoj: bolonjanoj; Sankta Petronio estas la protektanto de la bolonjanoj

(3) Febo: la sundio.

(4) Vi: Antonio Barberini, nevo de papo Urbano la VII ("regant' de l' mondo") kaj filo de Carlo Barberini, frato de la papo.

(5) La aglo roma: la romia potenco, imperio.

(6) L'antikva nesto: Romo.

(7) La reĝin'...: Venecio.

(8) Uzurpa regno: la turkoj.

(9) Gibelinoj, gelfoi estis respektive la mezepokaj favorantoj de la imperiestro kaj de la papo.

(10) Parnaso: laŭ la greka mitologio, la monto sankta por la Muzoj.

(11) Virŝafo: la konstelacio, el kiu la suno eliras la 20-an de aprilo.

(12)Panaro: rivero apud Modena, alfluanta al Po (Pado),

(13)L' ond': rivero Po, kien la filo de Febo falis fulmofrapita de sia patro mem ĉar li ne kapablis gvidi la sunĉaron.

(14)Secchia (pron. sekkja) rivero alfluanta al Po.

(15)Sur la flago estis boriloj: la modenanoj per boriloj trovis la subterajn akvojn.

(16)Podestà: urbestro.

(17)Tiu vortludo estas evidente insulte moka, ĉar en la tiutempa itala lingvo la vorto "potta" estis triviala esprimo por indiki la virinan seksorganon.

